

Informilo por Interlingvistoj

11-a jaro (tria serio) ISSN 1385-2191 n-ro 36 (1/2001)

Eldonata de Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo
(UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL- 3015 BJ Rotterdam, Nederlando)

Redaktoro: Detlev Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin; tel. +49-30-5412633; fax +49-30-5456742; e-mail:
blanke.gil@berlin.snafu.de

Enhavo

1 La japania interlingvistikado ise, ase, ose (USUI Hiroyuki)

2 Aranøoj pasintaj

2.1 La hungara lingvo en Eýropo (Laszlo Gados)

2.2 Pri kompara semantiko en Budapeŝto (Blazio Vaha)

2.3 10-a konferenco de GIL pri strukturoj de planlingvoj

3 Aranøoj estontaj

3.1 Esperantologia konferenco dum la 86-a UK en Zagrebo, 2001

3.2 11-a konferenco de GIL en 2001

4 Kelkaj rimarkoj pri GIL okaze de øia 10-a konferenco (Detlev Blanke)

5 Universitata vivo

5.1 Pri Esperanto kaj interlingvistiko en germanaj universitatoj (Detlev Blanke)

5.1.1 Enkonduke

5.1.2 Tipoj de universitataj aranøoj

5.1.3 Celoj kaj eblecoj de la universitataj aranøoj

5.1.4. Surprizoj dum la vintraj semestroj 1999/2000 kaj 2000/2001

5.1.5 Kial la intereso?

5.1.6. De kie venas la studentoj?

5.1.7 Pri la enhavo de la prelegaro

5.2 En universitatoj de Hungario kaj Pollando

5.3 Interlingvistiko en italaj universitatoj

5.4 Interlingvistika sesio en Poznan

6 Bibliografie trovi per „Trovanto“

7 Distingo por æina interlingvisto

8 Æu Glosa ankaý estonte?

IpI informas pri interlingvistikaj aktivecoj kaj publicajhoj, inkluzive lingvo-politikaj. La redaktoro nur mencias materialojn, kiujn li ricevis en la originalo au kiel kopion. La bulteno estas bibliografie orientita, tamen ankaŭ publikigas recenzojn, raportojn kaj aliajn materialojn.

En chi tiu kajero vi trovos la enhavtabelojn de kelkaj tre interesaj lingvopolitikaj libroj, bedaurinde precipe germanlingvaj. Kompreneble ne nur en la germana oni verkas pri lingvopolitikaj temoj lige al la Europa Unio. Tiaj libroj ja ankaŭ ekzistas

en aliaj lingvoj. Bedaŭre la redaktoro en estas sufiche informita pri similaj eldonajhoj en la angla, franca, itala k.s. Se li ricevos tiajn librojn, li same informos pri ili.

1 La japania interlingvistikado ise, ase, ose (USUI Hiroyuki)

USUI Hiroyuki

Antaŭrimarko de la redaktoro

Jen ni trovas modelan superrigardon pri landa situacio rilate al interlingvistiko. Mi tre bonvenigos similajn superrigardojn el aliaj landoj.

D.B.

Se vi provas superrigardi interlingvistikajn aktivecojn japaniajn, tiu æi lando longe fieris pri monumentaj laboroj de Esperantuje „indiøenaj gramatikistoj“ (esprimo pruntita de Probal Daŭgupto), kiuj - ne æiam science - priskribadis Esperanto-gramatikon øis øiaj plej etaj detaloj æefe en la japana lingvo, tradicio ligita al tiaj nomoj kiel OSSAKA Kenâi (vd. ekz. Oosaka 1981[1943]), la patro de la Esperanto-movado æi tie, kaj preskaŭ ne heredita de la nunaj generacioj. La lasta heredanto de la monumenta epoko certe estas ITÔ Kanzi, ali-nome Ludovikito.

Pli poste (en la 60aj kaj 70aj jaroj) sporade aperis unuopaj studentoj, kiuj post-diplome okupiøis jen pri la historio de Esperanto en Japanio aŭ Æinio (la tiama Esperanto-movado en ambaŭ landoj sufiæe forte reprezentiois en soci-ŝanøaj movadoj, tiel ke eæ ne-esperantistaj fakuloj pri tiu epoko havas kialon por okupiøi pri øi), jen pri Esperanto lingvistike (du eæ iris studi æe ELTE en Hungario!) - sed æiu-kaze temis pri unuopaj laboroj, kiuj ne fariøis granda fluo.

Depost la 80aj jaroj japanan interlingvistikadon signife helpas la fakto, ke øin morale subtenas prof. TANAKA Katuhiko, konata mongolisto-lingvisto, kiu preskaŭ fondis sia-specan skolon de „kritika“ socilingvistiko japana, arigante æirkaŭ si studentojn pri minoritataj lingvoj, lingva diskriminacio kaj ankaŭ tiujn pri Esperanto. Eblas esperantlingve ekscii pri lia aktiva kontribuo en la Socilingvistika Simpozio (Tokio, 1986) en la du-lingva akto de la simpozio (UEA(CED)/JEI 1987). Ankaŭ franclingve haveblas lia mallonga kontribuaøo al æe-uneska simpozio pri plurlingvismo (Tanaka 1986)

Kaj la lasta duono de la 90aj jaroj montris pli viglan, interesan pejzaøon rilate al interlingvistiko, æar samtempe aperis signifa nombro da postdiplomaj studentoj pri socilingvistiko aŭ lingvo-sociologio (sume iom malpli ol dek), kiuj aŭ estas esperantistoj aŭ eæ faras Esperanton centra temo de sia disertacio. Jam ekzistas almenaŭ tri magistrasj disertacioj iel rilatantaj al Esperanto: Yoshida 1997, Fukuti 1999 kaj Kitagawa 2000. Tiu preskaŭa miraklo (se ni konsideras, ke en Japanio ne ekzistas universitata Esperanto-fako aŭ eæ profesoro specialiøinta pri Esperanto) ŝuldiøas, unue, al la fondo de nova post-diploma fako lingvo-sociologio fare de la supre menciita Tanaka en la ŝtata Universitato Hitotubasi, kiu akceptis plurajn studentojn pri Esperanto; due menciindas vasta diskutado pri la lingva imperiismo de la angla æi-lande, en la unua duono de la sama jardeko, kiam æiuj æefaj tri oponentoj kontraŭ la angla (TSUDA Yukio, NAKAMURA Kei kaj ÔISI Syun'iti) menciis Esperanton kiel unu el eblaj alternativoj, tiel iom revivigante socian intereson pri tiu æi „forgesita“ lingvo (furoris siatempe japanlingva Tsuda 1990; cetere lia anglalingva verko [Tsuda 1986] postparole aprezas esperantistajn laborojn dokumenti lingvajn problemojn). Rezulte de æio æi, en du japanaj urboj - Tokio kaj Nagoya - fondiøis studentaj stud-rondoj pri socilingvistikaj temoj, kie esperantistoj nombre superregas kaj en diskutoj ofte menciøas Esperanto.

La grupo en Nagoya eldonas jaran kajeron kun studaøoj de la membroj. Øis nun aperis kvar kajeroj, bedaŭrinde nur en la japana.

La grupo en Tokio - pere de du tiu-rilate aktivaj membroj, t.e. KIMURA Gorô kaj la subskribinto - kunlaboras kun Japana Esperanto-Instituto (JEI), la landa asocio japana, por okazigo de socilingvistikemaj aranøoj, tiel enblovante novan venton ankaŭ en la Esperanto-movadon. Jen mallonge iliaj aktivecoj:

* En majo 1998 jam menciita kontraŭ-angla prof. Nakamura (Universitato Seizyo), venis prelegi en la Tutlanda Kunloøado de JEI („kunloøado“ estas japanismo por renkontio) pri la superrego de la angla kaj øia rilato al lingvaj rajtoj (resumo de lia prelego aperis japanlingve en la Revuo Orienta, (1998 aŭgusto, pp.1-10).

* En oktobro sam-jare okazis simpozio organizita de JEI - la unua tiu-tema en Japanio, æu en- aŭ ekster-esperantuje - pri lingvaj rajtoj, kun æ. 130 æeestantoj; triono estis ne-esperantistoj, inter kiuj kelkaj renomaj lingvistoj. En la simpozio kvar podianoj (HARA Kiyosi, fakulo pri la bretona el Universitato Zyosi-Bizyutu; NAKAGAWA Hiroshi, ainologo el Universitato

Tiba; HUZII Keinosuke, specialisto pri la japaniaj koreoj, Univ. Kôbe-Zyogakuin; TANI Hiroyuki, esperantisto-mongolisto el Universitato de Osaka pri Fremdaj Studoj) diskutis pri lingvaj rajtoj kaj ilia ebla realigo en Japanio.

* En oktobro 1999 la akto de la simpozio, kune kun tiu-temaj artikoloj de Heinz Kloss, Robert Phillipson, Tove Skutnabb-Kangas kaj Mark Fettes, diversaj konvencioj kaj deklaroj (ekz. Universala Deklaracio pri Lingvaj Rajtoj) estis eldonita æ ne-esperantista eldonejo, en la eldonkvanto de 1500 ekzempleroj (Genkoken-kenkyûkai 1999). Titolita „Kotoba eno Kenri (Rajtoj je lingvo)“. Øi fariøis la unua libro pri lingvaj rajtoj en la japana, tiel post longa interrompo denove farante la esperantistojn enkondukantoj de novaj sociaj ideoj - kiel okazis antaýmilite. La libro relative bone vendiøas.

Gravas en tiaj aktivecoj, ke oni ne propagandas Esperanton. Anstataýe oni devas provi trovi temojn (ne nepre pure interlingvistikajn – kiel lingvaj rajtoj) komunajn ankaý al ne-esperantistoj kaj pri tiuj temoj iniciati dialogon kun ili. La fakuloj ne-esperantistaj tiam konsciiøas, ke esperantistoj ne estas „utopiuloj“, kiuj nur æsas ne-realigeblaøojn, sed homoj serioze pensantaj kaj dividantaj kun ili problem-konscion pri la nuntempaj aferoj. La tokia studenta grupo nun estas en kontakto kun ne nur ne malmultaj socilingvistoj aý lingvo-sociologoj kiel jam menciitaj profesoroj Nakamura aý Hara, sed lastatempe eæ kun kelkaj profesoroj pri juro, kiuj jam de antaýe interesiøis pri lingvaj rajtoj. Se tia interrilatado povos daýre kreski, tio grave kontribuos al la prestiø de Esperanto, kaj espereble estonte eæ ebligu, ke esperantistoj povu interveni en diversaj lingvo-politike gravaj situacioj (ni devas memori, ke similaj intervenoj de æinaj esperantistoj - ekz.pri la latinigo - alportis ne malgrandan bonon al la movado tie).

Fine pri instruado de Esperanto en japanaj universitatoj. En 1997 JEI enketis pri instruado de Esperanto al siaj membroj, kiuj instruas en universitatoj kaj similaj altlernejoj (sume 79). Laý la japanlingva raporto aperinta en la Revuo Orienta (1998 junio, pp.10-11), inter la enketitoj sume 15 personoj respondis, ke ili iel havas okazon menci i Esperanton aý rilatajn lingvo-problemojn en kursoj universitataj: 6 personoj instruas Esperanton en lingvaj kursoj, dum 4 personoj pridiskutas tiujn temojn en la kadro de kursoj lingvistikaj aý socilingvaj - kaj 5 aliaj fojfoje mencias Esperanton en kursoj ali-temaj. Se la studenta interlingvistikado sukcesos estonte pli maturiøi, tio povos ankaý kontribui al pli-vigligo de Esperantaj kursoj universitataj. Tiu-kaze necesus havi ian kunlaboron kaj kunordigadon, fondante ekz. japanan version de Gesellschaft für Interlinguistik. Pro la aktivecoj dum la lastaj kelkaj jaroj jam aperis unu vic-profesoro ne-esperantista, kiu volis inviti esperantistan universitanon doni intensajn prelegojn pri Esperanto en sia universitato. Tiaj proponoj espereble multiøu. Iuj eæ komencas revii pri starigo de Esperanto-fako en iu japana universitato (en Japanio ekzistas æ. 600 universitatoj - kial ne estu unu, kiu havas Esperanto-fakon?). Sed æi tiu artikolo ne plu iru, æar tia revo ankoraý þajnus tro „utopia“ rakonto.

Bibliografio:

Fukuti, Tosio. 1999. Gengo-ken ni kansuru riron-teki kôsatu [Teoria konsidero pri lingvaj rajtoj]. Magistra disertacio prezentita al la Universitato Hitotubasi, Japanio. Gengoken-kenkyûkai, 1999. Kotobe e no kenri [Rajto je lingvoj]. Tôkyô: Sangen-sya.

Kitagawa, Hisasi. 2000. Gurôbaru-ka-zidai ni okeru gengo-teki byôdô no yukue [Kien iros la lingva egaleco en la epoko de tutmondiøo]. Magistra disertacio prezentita al Universitato Hitotubasi, Japanio.

Ossaka, Kenâi. 1981(1943). Esuperanto zen'tisi ryakkai [Malgranda nomografio pri esperantaj prepozicioj]. Tôkyô: JEI.

Tanaka, Katsuhiko. 1986. "La propagation en Orient des concepts europeens de "Langue Nationale" et de "Langue d'Etat" et leur role au service de l'imperialisme", en Lo Jacomo, Francois (red.) Plurilinguisme et communication, Paris: SELAF, pp.101-107.

Tsuda, Yukio. 1986. Language inequality and distortion. Amsterdam: John Benjamins.

Tsuda, Yukio, 1990. Eigo-sihai no kôzô [La strukturo de la angla-lingva regado]. Tôkyô: Daisan-syokan.

UEA(CED)/JEI. 1987. Socilingvistikaj aspektoj de la internacia lingvo – kun aparta konsidero pri la lingva diverseco de la mondo. Tôkyô: Japana Esperanto-Instituto.

Yoshida, Naoko. 1997. The Esperanto-movement: a case of collective verbal hygiene for a fairer communication order. Magistra disertacio prezentita al Universitato de Essex, Britio.

2 Aranøoj pasintaj

2.1 La hungara lingvo en Eýropo

Okazis rondtabla konferenco pri “La situacio de la hungara lingvo en la Eýropa Unio”, organizita fare de la Øenerala kaj Aplika Katedro de Scienca Universitato Eötvös Lorand (ELTE) en Budapeþto kaj la Hungaria Esperanto-Asocio (HEA). En la konferenco partoprenis pluraj vaste konataj lingvistoj, universitataj profesoroj kaj esperantistoj spertaj pri lingvistiko. Okazis enkondukaj paroloj fare de d-ro Gyorgy NANOVSZKY, æefsekcio-estro en la Ministerio pri Eksteraj Aferoj, prezidanto de la Hungaria Esperanto-Asocio, kaj d-ro Gyorgy SZEPE, prezidanto de la Hungara Lingvista Asocio (lia parolo estis laýtlegata pro lia malsano). Gvidis la konferencon la katedro-estro, d-ro Tamas GECSÓ.

Nanovfszky parolis æefe pri la lingvaj ordoj de diversaj internaciaj organizaåoj.

Szepe analizis la nunan, respektive la antaývideblajn lingvajn situaciojn en Eýropo.

En ambaý paroloj estis menciata, ne tre optimisme, ankaý la ebla rolo de Esperanto. En la alparoloj pri la sorto de la eýropaj lingvoj, æefe de la malpli parolataj lingvoj kaj ankaý pri la ebla rolo de Esperanto la opinioj estis tre diversaj: de la pesimismo øis la modera optimismo. La plimulto opiniis, ke la Eýropa Unio ne havas lingvopolitikon aý øi estas la nenifarada atendo favore al la disvastiøo de la angla. La fina konkludo formiøis, tamen, en tio, ke ni ne rajtas nenifaradi. Lingvistoj havantaj tre altan reputacion, ekzemple d-ro Laszlo DEME, unusence pledis por Esperanto kaj por la pli publika agado.

D-ro Istvan FODOR proponis estigi internacian kunlaboradon inter universitatoj pri la eýropa lingva demando.

Por la konferencantoj HEA disdonis inform-materialojn pri la eýropa lingva situacio.

La organizintoj intencas eldoni en la sekva jaro libron pri la enhavo de la konferenco.

Laszlo Gados

2.2 Pri kompara semantiko en Budapeþto

La 30-an kaj 31-an de oktobro en 2000 en la Budapeþta Universitato ELTE okazis konferenco pri kompara semantiko. La konferencon organizis la katedro pri øenerala kaj aplikata lingvistiko, kun partopreno de Zsuzsa Varga-Haszonits, Iván Bujdosó Árpád Máthé, lekciantaj æe la Esperanto-fako.

En unu el la sekcioj de la konferenco aperis pluraj esperantistoj. La programo kaj la konferenca volumo enhavis kaj enhavos, respektive, tri prelegojn kun rilatoj al Esperanto (Bujdosó, Máthé, Vaha).

Pálma S. Csiszár, juna esperantistino, prezentis kompare-semantikan analizon de vortoj kun signif-komponento pri „defendo“, surbaze de latina, itala kaj hungara materialo.

La volumo de la nuna konferenco þajnas esti aperonta venontjare. Åus aperis volumo kun materialo de la konferenco antaýa, en la sama serio.

Blazio Vaha

2.3 10-a konferenco de GIL pri strukturo de planlingvoj

La germana Gesellschaft für Interlinguistik (GIL, Societo pri Interlingvistiko) okazigis sian 10-an jaran konferencon de 17.-19.11.2000. La kadro-temo æi-foje estis "Pri la strukturo de planlingvoj". 30 personoj sekvis jenajn prelegojn:

Latino sine flexione – kompare kun la Latina, d-ino Vera Barandovská-Frank (Paderborn)

Pri la strukturo de Ido, Günter Anton (Prezidanto di Uniono por la Linguo Internaciona (Ido) Köthen)

Strukturaj specifaåoj de Occidental-Interlingue, Prof. d-ro Otto Back (Vieno)

Pri la strukturo kaj evoluo de Interlingua, Peter Liebig (Representante de Union Mundial pro Interlingua, Germana, Leipzig)

Naturalismo kaj Aýtonomismo en planlingvoj - prezentita æe la ekzemplo de frazeologio, d-rino habil. Sabine Fiedler (Leipzig)

La lasta instanco - kiu decidas pri la øusteco de planlingvaj esprimoj?
d-ro Werner Bormann (Hamburg)

Pri la strukturo de lingvoj de eksterteranoj, d-rino habil. Cornelia Mannewitz (Rostock),

Strukturkomparo pri Esperantidoj - kion oni kritikas æe Esperanto?
Claus J. Günkel (Eschweiler)

La projekto Loglan kaj øiaj sekvoj: Logiko, homa menso kaj socia realeco,
Ulrich Fellmann (Frankfurt/Main)

3 Aranøoj estontaj

3.1 Esperantologia Konferenco dum la 86-a UK en Zagrebo, 2001

Kiel æiujare, en la kadro de Universala Kongreso de Esperanto, ankaý æi-jare, dum la 86-a UK en Zagrebo okazos esperantologia konferenco. La kadra temo estos „Morto, drivo, defendo, disvastiøo: Esperanto antaý la sortoj kaj strategioj de senþtataj lingvoj”.

La konferencon kunordigas d-ro Mark Fettes, al kiu sin direktu interesiøantoj: mfettes@esperantic.org

3.2 11-a konferenco de GIL en 2001

La 11-a konferenco de GIL (23. – 25. 11. 2001, en Berlin), traktos la la kadran temon „Planlingvoj kaj iliaj komunumoj - ide-historiaj kaj aktualaj aspektoj”.

Informojn donas: Detlev Blanke, blanke.gil@snafu.de

4 Kelkaj rimarkoj pri GIL okaze de øia 10-a konferenco

Detlev Blanke

Kiel konate æiujare la germana scienca organizaåo „Gesellschaft für Interlinguistik e.V.“ (GIL t.e. la komunutila „Societo pri Interlingvistiko“) okazigas sian fakan konferencon, ligitan al la laýstatuta jarkunveno de siaj membroj. La aranøoj øenerale komenciøas vendrede vespere kaj finiøas dimanæe tagmeze. Ili okazas en la alloga kaj belregiona Æaskastelo Glienicke en Berlin. Partoprenas inter 25 - 35 personoj (en 1999 eæ estis 80) , inter ili ankaý nemembroj de GIL, æar la aranøoj estas publikaj. Oni havas la eblecon sekvi inter 8 - 12 prelegoj.

La konferenca lingvo øenerale estas la germana, kvankam neniu statuta paragrafo de GIL malpermesas la uzon de iu ajn alia lingvo. Oni jam prezentis prelegojn en Esperanto, Ido kaj Interlingua (en la lastaj du lingvoj ekz. prelegis Tazio Carlevaro). GIL eldonas la bibliografie orientitan bultenon „Interlinguistische Informationen“ (IntI, Interlingvistikaj Informoj, kvar kajeroj jare) kaj publikigas la prelegojn de la fakprogramoj en kromkajeroj al IntI (Beihefte).

Per sia 10-a konferenco GIL (kp. 2.2.) eniris la dekan jaron de sia ekzisto. Pro tio eble utilas mencii kelkajn karakterizaåojn de la societo.

Øi estas fondita en la jaro 1991 por ebligi sciencnivelan trakton de interlingvistikaj temoj. Øi ne estas, kaj tion tre necesas substreki, esperantista organizaåo. Sekve membras ankaý homoj, kiuj ne komprenas Esperanton.

Por GIL la objekto de interlingvistiko, kontraste al la tradicia kompreno, estas pli ol nur planlingvoj. Øi celas æiujn aspektojn de la internacia lingva komunikado, do inkludas ankaý etnolingvojn en la rolo de internacia komunikilo.

La 9-a konferenco de GIL en 1999 (kp. IpI 30) ekz. traktis, kunlabore kun profesia lingvistika societo en Berlin (Verein zur Förderung sprachwissenschaftlicher Studien e.V.) sur alta nivelo la lingvajn problemojn en Eýropo.

En la centro de la intereso de GIL troviøas la planlingvoj. Koscianta pri la diferenco inter projekto kaj lingvo GIL aparte okupiøas pri Esperanto, tion øi devas fari simple pro la fakto, ke Esperanto estas la sola vere lingviøinta planlingva sistemo. Resumante la rezultojn de la agado de GIL, oni eble povus elstarigi jenajn punktojn:

1. Certgrade GIL sukcesis membrigi la plej multajn interlingvistikajn fakulojn el Germanio (kelkajn eæ el eksterlando) kaj aliajn interesatojn pri la temo. Tamen ekzistas talentaj personoj, aparte en la junularo, kiuj diplomiois aý eæ doktoriois pri lingvistikaj temoj aý problemoj, gravaj por la interdisciplina agado de GIL, kiuj bedaýrinde ankoraý ne aliøis al la societo.

2. La agado de GIL helpis, ke diversaj interlingvistike kompetentaj personoj aktivadas per prelegoj, publicaåoj kaj alimaniere. Eble ankaý al la ekzisto de GIL kaj øia scio-pera funkcio iom þuldiøas la fakto, ke antaý nelonge membro de

GIL habilitiis pri esperantologia temo æ germana universitato (d-rino Sabine Fiedler en la universitato de Leipzig).

3. GIL donas podion ankaý al tiaj interlingvistike interesataj kaj talentaj personoj, kiuj alikaze ne havus la eblecon (aý ne sentus la emon) pretigi sciencajn prelegojn.

4. La materialoj, kiujn GIL eldonas, entenas kontribuojn pri fako, kiu en la scienca pejzaø de æiu lando estas tre nekonata aý miskomprenata. Æar la publicaåoj de GIL atingas ne malmultajn bibliotekojn kaj sciencistojn ekster GIL, ili diskonigas la fakon kaj (aparte en bibliotekoj) konserviåas kiel konsult-materialoj.

5. GIL klopodas servi siajn membrojn per materialoj, kiuj ebligas teni la superrigardon pri la evoluo de la fako en internacia kadro. Samtempe, aparte dum la konferencoj, øi estas interpanøejo de spertoj kaj scioj.

6. GIL estas faka adreso por sciencaj kontaktoj. Øi certgrade estas establita en la lingvistika pejzaø de Germanio kiel fakorganizaåo, parte eæ en eksterlando. Tion i.a. montras la ligoj al grandaj bibliografioj, al elektronikaj informsystemoj k.s. La retpaø de GIL (<http://user.berlin.de/~gil.berlin>), kiu certe daýre estas plibonigebla, pli kaj pli fariåas informejo por sciencistoj, kiuj laý øi mendas materialojn. Membroj de GIL pretigas sciencajn ekspertizojn.

7. Certgrade GIL ankaý havas iom da internacia efiko. Tion montras kelkaj el øiaj membroj i.a. en Aýstrio, Æinio, Hungario, Japanio, Nederlando kaj Svisio. Por atingi pli da konscio pri la rezultoj de interlingvistiko kaj esperantologio estus dezirinde, ke en pli da landoj estiøu similaj aý alitipaj organizaåoj, kiuj povus formi internacian reton. Eble la spertoj de GIL iom povus helpi por atingi tion (kp. la prezenton de GIL en "Esperantologio - Esperanto Studies"/1999).

5 Universitata vivo

5.1 Pri Esperanto kaj interlingvistiko en germanaj universitatoj– kaj pri kelkaj lastatempaj spertoj el Humboldt-Universitato, Berlin

Detlev Blanke

5.1.1 Enkonduke

Sub la impreso de mia prelegaro pri interlingvistiko en Humboldt-Universitato Berlin, kiun mi prezentis dum la vintra semestro 1999/2000, mi verkis artikolon, kiu aperis en „Esperanto aktuell“ 1/2000 kaj „Internacia Pedagogia Revuo“ 3/2000. La priksribataj spertoj precize ripetis dum la vintra semestro 2000/2001. Pro tio mi represas la artikolon kun kelkaj modifoj, por doni iujn informojn kaj vidpunktojn esperante iom stimuli aliajn kolegojn ekagadi en la grava universitata medio.

Samtempe mi plene konscias, ke al kelkaj kolegoj, kiuj jam longe kaj tre sukcese enigis Esperanton en la prelego-programojn de siaj universitatoj, mi ne prezentas ion mirige novan.

Tio aparte validas por kelkaj hungaraj kolegoj, por d-rino Ilona Koutny en Poznan/ Pollando, kaj parte ankaý por kolegoj en Italio (ekz. prof. Pennacietti en Torino). Pro tio oni trovas post mia artikolo du reagojn al mia unua kontribuo.

5.1.2 Tipoj de universitataj aranøoj

Bedaýrinde nur malofte en la kadro de germanaj universitatoj aý aliaj altlernejoj oni trovas aranøojn pri Esperanto-rilataj temoj. Tio en vasta kadro ankaý validas por la plej multaj aliaj landoj. Akademiaj aranøoj pri interlingvistiko kaj esperantologio, do sciencaj prelegoj kaj seminarioj, estas raraj esceptoj. Parolante pri universitatoj mi subkomprenas ankaý alitipajn altlernejojn, kie oni povas akiri universitatnivelaajn diplomojn, doktorii kaj habilitiøi (do temas pri øenerala tradicitipa Universitato, Teknika Universitato kaj diverstipaj altlernejoj).

Parolante pri la aranøoj oni æefe povas distingi:

- a) lingvokursoj pri Esperanto
- b) diversnivela sciencaj seminarioj pri interlingvistiko kaj esperantologio
- c) sciencaj prelegaroj pri interlingvistiko kaj esperantologio.

d) enigo de hungaro pri interlingvistiko kaj/aŭ pri Esperanto en iun alian prelegaron, plej ofte pri ĝenerala lingvistiko

Tiuj aranĝoj kutime apartenas al la planita kaj presita programo de la universitato.

Krome:

e) Fojfoje studentoj rajtas prelegi en la kadro de lingvistikaj kursoj, aŭ interlingvisto respektive kompetenta esperantisto estas invitita kaj donas gastprelegon en la kadro de lingvistika kurso (siatempo sufiĉe ofte en GDR).

Malsame al Hungario (Budapeŝto, Szombathely, Debreczen) en Germanio ne ekzistas establita fakoj „Esperanto“ aŭ „Esperantologio“ aŭ „Interlingvistiko“ en iuj universitataj strukturoj. La komparoj de universitataj situacioj kaj rezultoj krome malfacilas, ĉar tre malsamas la universitataj strukturoj, fakodisdividoj kaj titoloj. Aparta memstara instituto pri interlingvistiko/ esperantologio, kie plene plenumas kaj plentempe laboras katedra profesoro, havas asistantojn, prelegas kaj esploras ktp., kiel kutime ĉe establita fakoj, ĉi nun nenie ekzistas en la mondo, eĉ ne en Budapeŝto, kie la fakoj „Esperantologio“ apartenas al la Katedro pri Aplika Lingvistiko. Se temas pri la tipologio de la aranĝoj mi ne pretendas doni internacie validan skemon, mi plejparte sekvas la germanajn spertojn.

La universitataj aranĝoj plej ofte okazas dum du semajnhoroj (do dufoje 45 minutoj). Se ili regule okazas laŭ la tuta semestro, oni havas 13 – 16 semajnojn, depende de la longeco de la semestroj kaj eventualaj festotagoj kaj aliaj „tempoperdoj“. Mi havas la impreson, ke la vintro-semestraj prelegoj estas pli forte frekventataj ol la somero-semestraj.

Malfacilas prijuĝi, kiu aranĝo-tipo estas la plej konvena. Dependas de la vidpunktoj kaj celoj. En la lingvo-kursoj oni konatiĝas pli profunde kun la lingvo Esperanto, sed apenaŭ ion aŭdas pri sciencaj aspektoj. En la seminarioj kaj prelegoj temas ĉefe pri sciencaj aspektoj, kio ne ekskludas etan enkondukon en la strukturon de Esperanto, almenaŭ tiom, ke la studentoj povus ekhavi intereson okupiĝi pli profunde pri la lingvo aŭ ne. Oni tamen ne instruas la lingvon. Kadre de la seminarioj eblas pli forte aktivigi la studentojn, kiuj eble prelegetos, diskutos aŭ ellaboros hejmmstudiaĵojn. La prelegoj ebligas pli sisteman kaj pli riĉan materialprezenton, sed la studentoj ĝenerale estas relative pasivaj aŭskultantoj. Prelegojn kaj seminariojn oni kvitanĉas en la studentaj libretoj kaj/aŭ disdonas atestilojn kun diversaj valoroj k.s.

Lingvokursoj (a) kelkfoje okazas. Ilin aranĝas membroj de universitatoj, foje ankaŭ studentoj kun la subteno/permiso de iu profesoro. Kvankam mi klopodas sekvi la universitatan pejzaĝon en Germanio [rilate al a) –c)] laŭ mia superrigardo jare (aŭ dum unu semestro) okazas ne pli ol 2-3 kursoj, foje eble neniu. Tio estas bedaŭrinda, des pli, ĉar ja ekzistas kelkaj tre spertaj esperantistoj, kiuj studis filologiojn aŭ/kaj fremdajn lingvojn, havas kaj foje eĉ konservas iujn ligojn al universitatoj.

Sciencaj seminarioj (b) fojfoje okazis en la universitatoj de Frankfurt/Main (d-rino Alicja Sakaguchi), Leipzig (d-rino Sabine Fiedler)² kaj Paderborn (tie enkadrigita en pedagogiajn-kibernetikajn programojn: d-rino Vera Barandovská-Frank)³.

Sciencaj prelegoj (c) okazadas pli malpli regule en la universitatoj de Hamburg (d-ro Werner Bormann)⁴, Rostock (d-rino habil. Cornelia Mannewitz) kaj Berlin (Humboldt-Universitato:

Dr. sc. Detlev Blanke). Sciencajn prelegojn ĝenerale rajtas prezenti nur habilitiĝintaj⁵ sciencistoj aŭ nomumitaj „instrukomisiitoj“.

Post la habilitiĝoj de d-rinoj Sabine Fiedler (Leipzig) kaj Alicja Sakaguchi (Poznan/Pollando) ankaŭ ili rajtos prelegi (tion jam faris d-rino habil. Sabine Fiedler dum la vintra semestro 1999/2000 en Leipzig). Foje eblas ligi al sciencaj prelegoj iujn aldonajn kursojn, ekzemple semajnfinajn intensajn kursojn en aŭ ekster la ejoj de la universitato.

Notes:

1. Pri la temo kp. ankaŭ la ĉapitron „Akademia institucio“ en mia eseo „Esperanto kaj lingvistiko – scienccpolitikaj aspektoj“, en : Esperanto-Dokumente 2, Osnabrück: Deutsches Esperanto-Institut, 1995, p. 11 – 12.
2. En la kadro de la Instituto pri angla filologio
3. En la kadro de la Instituto pri kibernetiko.
4. Verŝajne la universitato de Hamburg havas la plej longan tradicion rilate al la temo. D-ro Werner Bormann estas „Instrukomisiito pri interlingvistiko“, en la kadro de la Instituto pri fonetiko, ĝenerala lingvoscienco kaj hindoermanistiko.
5. Post la habilitiĝo (1985, Dr. sc. = Dr. habil.) en la jaro 1988 en GDR mi estis nomumita „Honoraria docento pri interlingvistiko“ kaj ricevis la universitatan instrurajton „Facultas docendi“. Laŭ la kontrakto pri la germana unuigo akiritaj titoloj estas transpreneblaj. Post la unuigo la universitato konfirmis kaj akceptis mian GDR-tipan habilitiĝon (1995 kiel „venia legendi“). Cetere, mi sporade prelegis en la universitato jam post 1976.

5.1.3 Celoj kaj eblecoj de la universitataj aranĝoj

La ĉefa celo de la universitataj aranĝoj ne estas la bakado de novaj esperantistoj per altruda varbado. Se oni provus fari tion, la rezulto ne nur estus negativa ĉe la studentoj mem, sed la prestiĝo de la aranĝoj en la kadro de la universitatoj falus kaj ekestus la „ĉanco“, ke la universitato ne plu permesus tiajn aranĝojn.

La ĉefa valoro estas, ke studentoj kontaktiĝas kun problemaro, antaŭe ofte komplete aŭ grandparte nekonata por ili. Ili krome konatiĝas kun ĝeneralaj lingvistikaj problemoj el iom nekutima vido-direkto, tra la prismo de interlingvistikaj ideoj. Eble nur malmultaj studentoj vere interesiĝos pri Esperanto. Ne gravas. Ili aŭdos ion seriozan (espereble !) pri problemaro, inter lingvistoj ofte neserize aŭ entute ne prezentita. Ĉar multaj studentoj estos la intelektaj akivuloj de la estonteco, ilia baza scio pri la interlingvistika problemaro ĝenerale, kaj pri Esperanto aparte, povas havi pozitivajn sekvojn (ekz. en eldonejoj, redakcioj de gazetoj, ĉe en la universitatoj mem ktp.). Mi tion jam spertis sufiĉe ofte.

Nur malofte studentoj aŭ diplomitoj uzas la eblecojn verki disertaĵojn pri rilataj temoj kaj akiri akademiajn titolojn. Tamen ankaŭ en Germanio principe eblas verki diplomigajn, magistrigajn, doktorigajn kaj ĉe habilitigajn disertaciojn pri interlingvistikaj aŭ/kaj esperantologiaj temoj. Tio kompreneble tre dependas de la kandidato mem, de la scienca medio kaj de tio, ĉu oni trovos aprobon ĉe kelkaj profesoroj en difinitaj universitatoj. Pri la ĉi-rilate lastaj kazoj oni povis legi ankaŭ sur la paĝoj de IpI .

5.1.4 Surprizoj dum la vintraj semestroj 1999/2000 kaj 2000/2001

Kvankam ekde 1988 mi prezentis prelegojn dum entute almenaŭ 20 semestroj, la lastaj prelegaroj verŝajne estis miaj ĉis nun plej sukcesaj kaj stimulaĵaj. Laŭ miaj ĉisnunaj spertoj la kvanto de la studentoj tre varias. Foje estas 40, foje 20, sed plej ofte inter 10 – 15. Unufoje mi ĉe prelegis antaŭ du studentoj, kiuj eltenis ĉiujn 16 duhorajn prelegojn dum la semestro. Sed tio estas escepto, kaj fakte neekonomia. Ĉajne similajn spertojn havas ankaŭ la aliaj koleg(in)oj.

La prelegaro dum la vintra semestro 1999/2000 en Humboldt-Universitato estis aparte sukcesa.

Dum la semestro mi havis 16 semajnhorojn (po 90 minutoj). Dum la unuaj prelegoj (1. – 4.) venis inter 60 kaj 75 studentoj. Mi estis tute konfuzita pro la grandega neniam antaŭe spertita intereso kaj demandis, ĉu ili eventuale eraris en la prelegejo. Ne, ili volis ion scii pri Esperanto... Kompreneble la kvanto reduktiĝis iom post iom kaj la kurso stabiligis tiel, ke ĉis la fino mi havis ĉ. 35- 40 diversajn studentojn. Sed entute per la unuopaj prelegoj mi atingis multe pli ol 100 studentojn, almenaŭ peris por ili bazajn sciojn, ĉar dum la unuaj prelegoj estas granda nestabileco. Ja forestas 20 homoj, sed la sekvan fojon venas dudek aliaj...

Do, konscia, ke ne ĉiuj restos ĉis la 16-a semajno, des pli, ĉar temas pri nedevisa oferto, per la unuaj 3 prelegoj mi donis tri malsamkarakterajn enkondukojn en la kadran temon, tiel, ke ĉiuj, kiuj venis nur al tiuj prelegoj, havu sufiĉe da informoj pri interlingvistiko ĝenerale kaj pri Esperanto aparte.

Absolute la sama sperto ripetiĝis dum la vintro-semestro 2000/2001. La lastajn 2-3 prelegojn vizitis ĉ. 35 diversaj studentoj.

5.1.5 Kial la intereso?

Por ambaŭ prelegaroj mi ne komplete sukcesis ekscii la kialojn de la subita intereso. Laŭ miaj singardaĵaj enketoj la scivolemo vekigis i.a. pro

- informoj en la gazetaro (lige al la 84-a UK en Berlin)
- la vorto Esperanto ligita al la muzikgrupo „Amikeco“, kiu sufiĉe furoris en Germanio, i.a. eldonis kompaktdiskon kun la nomo „Esperanto“
- la pli forta interesiĝo pri la lingva demando ene de Eŭropa Unio, relative forte stimulita per la diskutoj lige al la sinteno de la finna prezidento pri la allaso /neallaso de la germana lingvo en la EU-rilataj aranĝoj en Finnlando (la gazetaro raportis kaj lige al tio ja menciis fojfoje Esperanton).
- Ankaŭ gravis, ke la „Instituto pri germana lingvo kaj lingvistiko“ de Humboldt-Universitato (kie multaj eksterlandaj studentoj studas krom iujn aliajn lingvojn ankaŭ la germanan, krome ĝeneralan kaj germanan lingvistikon) donis bonan statuson al la certe iom ekzotika prelego (ĉi estis libere elektebla elemento de baza instruado pri lingvistiko). La aparta libreto kun la studo-oferto de la instituto enhavis trionpaĝan prezenton de mia prelegaro. Krome la prelegaro estis indikita en la kompleta prelego-libro de la universitato (dufoje, ĉar ankaŭ sub „Studium generale“).

La memoro pri certa eĉo lige al la 84-a UK en Berlino eble iom efikas al la vintra semestro 1999/2001, sed eventuale jam ne plu por la sekva vintra semestro.

5.1.6 De kie venas la studentoj?

Eble 80 % de la studentoj studas iujn lingvojn. Sed ankaŭ aperas studentoj de politikscienco, juro, interkulturaj studoj, publicistiko k.a. Ili aĉefe venas de Humboldt-Universitato, tamen ankaŭ el aliaj universitatoj de Berlin (Libera Universitato, Teknika Universitato). Inter la studentoj estis multaj el eksterlando. Dum la semestro 1999/2000 ekz. partoprenis rusa germanisto, kiu havis laborstipendion de Deutscher Bundestag. Dum sia junaĝo li eĉ lernis Esperanton. Iuj venis laŭ EU-programoj (ekz. Sokrates). Inter la studentoj troviĝis kelkaj el almenaŭ jenaj landoj: Aŭstrio, Aĉeĉio, Aĉinio, Francio, Finnlando, Georgio, Hungario, Islando, Kanado, Kroatio, Pollando, Rumanio, Rusio, Turkio kaj, kompreneble, Germanio. Aĉar mi nur hazarde eksciis pri la landoj kaj ne sisteme enketis, la listo certe ne estas kompleta.

Dum la vintro-semestro 1999/2000 kelkaj studentoj uzis la oferton de sperta kursgvidanto el Berlino kaj sekvis kurson. Kaj fine de la dua prelegaro oni jam povis anonci la ekziston de nove fondita grupo BSE (Berlinaj Studentaj Esperantistoj).

Mi rimarkis kun kontento, ke aĉiuj studentoj estis tre interesitaj, min foje interrompis per demandoj (tion mi aĉiam permesas), venis post la prelego kun demandoj kaj materialpetoj. Aĉeinino tralaboris du aĉus aperintajn aĉinlingvajn librojn (traduko de „Historio de la Mondolingvo“ de Drezen kaj libro pri la historio de la aĉina Esperanto-movado). Aĉiuj studentoj ricevis diversajn materialojn, (i.a. bibliografion, skemojn, tekstojn ktp.). Turka studento interesiĝis pri Solresol, aĉar li volas fariĝi filmreĝisoro kaj eluzi la ideon de la muzika lingvo. Aĉŝtra studento bezonis kvalifikan noton kaj pro tio verkis tre bonan eseon pri la motivo de la persekutoj de Esperanto sub la naziismo. Pro la sama kialo hungarino verkis laboraĉon (pri la apriora pazigrafio de Kalmán).

5.1.7 Pri la enhavo de la prelegaro

Aĉar mi kutimas prelegi preskaŭ sen manuskripto mi prezentas abundon da aparte preparitaj folioj (por retroprojekciilo), kiuj sumiĝis por la tuta prelegaro je aĉ. 700 folioj. Krome mi aĉiam cirkuligas faklibrojn. Post preskaŭ aĉiu prelego mi disdonas foliojn kun skemoj kaj informoj. Kiel unuan materialon mi prezentas al ili iom ampleksan bibliografion pri „Interlingvistiko – planlingvoj – esperantologio“. La kadra temo de la prelegaroj estis „Esperanto: Kiel el projekto fariĝis vivanta lingvo“, resp.

„ De projekto al vivnata lingvo - Esperanto: strukturo, evoluo, funkciado“

Jen la temoj de la unuopaj semajnaj prelegoj:

1. Unua renkontiĝo: malfermo de la prelegaro, prezento de la aĉefa enhavo
2. Enkonduko en la prelegaron (resuma anticipo de 2. – 15.)
3. Pri la fenomeno „planlingvo“: Aspektoj de lingvoplanado kaj lingvopolitiko
4. Survoje al universala lingvo: Projektoj kaj tipologio
5. De projekto al lingvo: Etapoj de enkondukiĝo de planlingva projekto en la praktikon
6. Pri planlingva praktiko: Prezento de vidbenda kaj sonbenda materialoj
7. Ekesto de Esperanto: Motivoj kaj strukturprincipoj
8. Lingvistika karakterizo de Esperanto I (morfemaro, fonologio, morfologio, gramatiko)
9. Lingvistika karakterizo de Esperanto II (vortfarado, karakterizo de la leksiko, evoluo-problemoj)
10. Traduko de simpla teksto
11. Esperanto en la internacia praktiko: Superrigardo pri komunikaj sferoj
12. Esperanto kiel faklingvo
13. Esperanto kiel lingvo de literaturo
14. La lingvo-komunumo de Esperanto: Historiaj etapoj
15. La lingvo-komunumo de Esperanto: Aktuala strukturo kaj evoluproblemoj
16. Teoriaj kaj sciencorganizaj problemoj: Pri Esperantologio

Mi forte esperas, ke estonte pli da kolegoj uzos siajn eblecojn kaj ofertas diverstipajn aranĝojn en la universitata medio, aĉar tie troviĝas perspektivo-havaj ĉancoj, verĉajne ne sufiĉe aprezataj.

5.2 En universitatoj de Hungario kaj Pollando

Ilona Koutny

D-rino Ilona Koutny dum februaro 2000 sendis jenan tekston reage al la unue prezentita artikolo (kp. la enkondukon 5.1 . Mi tre dankas al koleginio Koutny kaj tre øojus, se venus similaj raportoj pri la situacio ankaý en aliaj landoj.
D.B.

1. En ELTE (Budapeþto) estas daýre du personoj plentempe dungitaj por la celoj de la Esperantologia fakto (d-ino Zsuzsa Varga-Haszonits kaj Iván Bujdosó), sed kiel malgranda fakto ili ne konsistigas apartan katedron. La instruado daýras dum 4 jaroj (la nunan staton mi ne scias precize, sed æ. kun 3+8+8+4 semajnohoroj) kaj finiøas kun universitata diplomo. Krome interlingvistiko (2 semajnohoroj dum unu semestro) estas en la oferto de studentoj pri øenerala kaj aplikata lingvistiko.
2. En altlernejo BDTF (Szombathely, HU) d-ino Katalin Smideliusz gvidas kurson pri interlingvistiko kaj laý ebleco pri Esperanto enkadre de la Aplikatlingvistika katedro. Pri interesa eksperimento kun la studentoj pri kreado de artefaritaj lingvoj þi raportis pasintjare dum la Hungara Aplikatlingvistika Konferenco (Artikolo aperis en IPR 2/99, krome kp. IpI 31-red.)
3. En la Jagielona Universitato en Krakovo (PL) Maria Majerczak gvidas sukcesan 2-jaran programon (pluraj semestrohoroj) pri Esperanto.
4. En Adam Mickiewicz Universitato en Poznan (PL) mi startigis 3-jarajn postdiplomajn Interlingvistikajn Studojn por esperantistoj (simile al modernaj filologioj) en speciala formo (unusemajna vizito dum la semestro). Ni planas enkonduki Esperanton inter la lingvojn devige elektitajn de gestudentoj de la fakto Etnolingvistiko (æefa fakto de la Lingvistika Instituto, kie mi laboras por la Hungara fakto). Se tio sukcesos en la sekva studjaro, tiam gestudentoj studos Esperanton dum 4 jaroj (8+8+8+4 semajnohoroj). Nuna partoprenanto de la Interlingvistikaj studoj, Bradio Moro intertempe estis dungita en la Instituto (kompreneble instrui la anglan!), kaj kontribuos al la instruado. Ankaý alia usona lektoro kaj doktora studento pri geografio partoprenas la studojn. Tiel elformiøos ebleco por kreiøo de esperantologia laborejo. Nuntempe okazas nur malgranda kurso pri Esperanto komencita de mi, sed daurigata far Bradio.

5.3 Interlingvistiko en italaj universitatoj

Renato Corsetti

Ankaý Renato Corsetti en 2000 reagis al la unua versio de la artikolo sub 5.1 Jen lia mesaøo, (en kiu li ne mencias sian universitatan agadon en la universitato „La Sapienza“ de Romo):

...Kvankam estas tre malfacile kompari la universitatajn strukturojn en malsamaj landoj, mi dirus ke la nura oficiala kurso pri Interlingvistiko kaj Esperantologio en Italujo ekzistas æe la Universitato de Torino.

Kvankam øia oficiala nomo en la itala estas „Cattedra di Interlinguistica ed Esperantologia“, la signifo de tiu esprimo estas, laý la lingvouzo de Detlev, „libere elektelebla fakto“ en la kadro de universitata Departemento (tiu eble estas nia nomo por tio, kion Detlev nomas „katedro“).

Fabrizio Pennacchietti, kiu instruas tie, havis laý mia kompreno de la situacio, similajn spertojn pri nombro da studentoj kiel Detlev...

En aliaj universitatoj estas unuopaj esperantistoj, sed nenie estas kurso pri Esperanto aý pri interlingvistiko, kvankam ne mankas agado: en la universitato de Mauro La Torre (Universitato Roma 3) oni aranøis kursojn de Esperanto por instruistoj (ili ja okupiøas pri pedagogio), en aliaj universitatoj oni sekvas finstudajn disertaciojn, ktp.

La grupo pri Interlingvistiko kaj Esperantologio de Itala Esperanto-Federacio (ni decidis eæ ne þajni ke ni ne estas esperantistoj) regule informas æiujn membrojn de la Itala Societo pri Lingvistiko pri lingvistike interesaj aferoj pri Esperanto, kaj øenerale ni rajtas diri ke ne ekzistas nun itala lingvisto, kiu iel ne aýdis pri Interlingvistiko aý pri Esperanto. Kiel æie malgranda grupo estas favora, malgranda grupo estas tute malfavora kaj granda grupo estas pli malpli indiferenta.
Corsetti@itelcad.it

5.4 Interlingvistika sesio en Poznan

Inter la 25 - 29.09 2000 okazis la sekva sesio de la Interlingvistikaj Studoj en la Adam Mickiewicz Universitato en Poznan (Pollando).

Kvin novaj studemuloj (unu brito, unu belgo kaj 3 poloj) aliøis al la grupo.

Kursoj pri esperanta literaturo (Lidia Ligeza), pri komunikado (d-ino Ilona Koutny), pri fonetiko (d-ino Ilona Koutny) kaj pri kulturo (d-ro Zbigniew Galor) konsistigis la programon. Zofia Banet-Fornalowa prezentis la esperantan teatron arton kaj Judita Schiller la filmarton.

La sesion kompletigis la kultura programo de Arkones (Artaj Konfrontiøj Esperantistaj) semajnfine: spektakloj de Jadwiga Gibczynska, Jerzy Fornal kaj de Studio "P". La partoprenantoj povis rigardi filmojn esperante parolantajn post la enkonduka prelego de J. Schiller, aýskulti prelegon de Z. Fornalowa pri sia nova libro "Familio Zamenhof". Ne mankis muziko, kantado kaj diskutoj pri la rolo de Esperanto. Dum la aranø la unuan fojon okazis ankaý du AIS-kursoj enkadre de la 18-a Pola Studsesio organizita far la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo (Bydgoszcz).
Ilona Koutny: ikoutny@hum.amu.edu.pl

6 Bibliografie trovi per “Trovanto”, la plej granda katalogo en la reto

La Internacia Esperanto-Muzeo de la Aýstria Nacia Biblioteko, kiu posedas la plej grandan planlingvan bibliotekon, realigas ekde 1996 unikan projekton: la kreon de la elektronika katalogo TROVANTO, konsultebla en interreto. Troviøas jam 12.000 rikordoj (dokumentoj) en øi, kaj tiu nombro kreskas æiu-monate. Jam nun øi estas la plej granda katalogo pri Esperanto kaj interlingvistiko.

Kiuj dokumentoj troviøas en TROVANTO?

Libroj, broþuroj, manuskriptoj, nekomerca literaturo, muziknotoj, kasedoj, diskoj, vidbendoj...

Oni trovas la dokumentojn laý aýtoroj, titoloj, serioj, eldon-jaroj, eldonejoj, libro-numeroj, aperlokoj, temoj...

Alvoko

La Aýstria Nacia Biblioteko financas la kreon de TROVANTO. La daýrigo de la laboro tamen povas okazi nur, se la esperantistoj øin fakte bezonas. Tio signifas, se sufiæe da homoj utiligas TROVANTON en la interreto. Tial ni invitas vin regule viziti øin. Øia adreso:

<http://euler.onb.ac.at/cgi-allegro/maske.pl?db=esperanto>

Alia eblo aliri estas tra la hejmpaøo de la Aýstria Nacia Biblioteko: <http://www.onb.ac.at/sammlgn/safr.htm>

Se vi volas esti informita pri la evoluo de TROVANTO, skribu al helga.farukuoye@onb.ac.at

7 Distingo por æina interlingvisto

Komenco de 2001, æinaj þtataj instancoj honorigis la konatan æinan interlingviston LIU Haitao (Datong) per la titolo „Excellent senior engineer“ (elstara supera inøeniero), titolo kutime nur donata al elstara inøeniero kaj sciencisto en industrio. La titolo en Æinio estas egalsignifa al universitata orda profesoro. Gratulon al nia kolego !

Por informiøi pri la multflanka agdo de la distingito rigardu: <http://htliu.yeah.net>

8 Glosa ankaý estonte?

La lasta eldono de la cirkulero “Plu glosa nota” (Glosa-Infoformoj) aperis en 1998.

Æ u Glosa plu ekzistos ?

[Informilo por Interlingvistoj](#)

[Esperantologio kaj Interlingvistiko](#)

[Centro de Esploro kaj Dokumentado](#)

Sendu demandojn au komentojn al [Mark Fettes](#).